

ĉeĥa vlakový dispečing
dana togovervågning
franca poste de régulation

germana Zugüberwachung
hungara forgalomirányító helviség

itala ufficio di dirigenza
rumana regulator de trafic
serba postavnica za nadzor nad kretanjem
vozova
slovaka dispečerské riadenie jazdy vlaku
Esperanto trafikreguligejo

Komparo de tiuj «difinoj» montras nesisteman vortigon; komparo de la nacilingvaj terminoj montras eĉ ĥaason. El la «difinoj» iom klariĝas, ke en la ejo 06721 oni kontrolas ĉiujn trajnojn en la koncerna subordita teritorio, sekve ekzistas kontinua ordona tasko, dum en la ejo 06686 oni agas nur okaze de neregulaĵoj. Specialaĵo de la ejo 06680 estas kompetenteco nur por ĉeflinioj. Tie ne estas dirite, ĉu temas pri kontinua aŭ nur porokaza direktado. Bonvolu pripensi plej taŭgajn terminojn. Neniu termino enhavu la elementon «regejo». Jen pluraj eblaj solvoj:

- 06680 1) trajntrafikreguligejo centra
2) trajntrafikreguligejo ĉeflinia
3) trajntrafikdirektejo
- 06686 1) trajntrafikreguligejo porokaza
2) trajntrafikdisponejo
- 06721 1) trajntrafikreguligejo
2) trajntrafikordonejo

PIV klarigas:

direkti 1 Turni ion konkretan al la celata punkto.
direkti 2 Irigi ion abstraktan al iu celo.
disponi 1 Decidi laŭ sia bontrovo, kio fariĝos pri iu aŭ io.
ordoni Estre esprimi al iu sian volon, ke li/ŝi faru ion.
reguligi Fari ion regula.

Aldoninde estas, ke en *RailLexic* ankaŭ ekzistas la ejoj 06218 = trafikreguligejo konstanta, kaj 06687 = trajntrafikregejo regiona. Sed ambaŭ nocioj ne estas difinitaj.

Karaj geamikoj, mi dankas al ĉiuj pasintmonataj kunlaborintoj. Tamen sciu, ke por vivoteni nian Terminaran Sekcion, necesas pli vigla kontribuado, plej facile per retroŝto. Mi komprenas, ke eventuale iuj kolegoj ne ŝatas cerbumi pri iu kontraŭpropono, aŭ nur jese mesaĝi. Pro tio mi nun komencas doni po minimume du terminproponojn. Komprenoble mi ankaŭ ĝojus pri aldonaj proponoj un argumentoj. Sed - dum tia laboro ne forgesu gaje festi en familiaj kaj geamikaj rondoj laŭ eŭropa aŭ azia tradicio - antaŭ aŭ post la jarŝanĝo.

Pacan, sanan, sukcesan kaj feliĉan novan jaron elkore deziras
Heinz Hoffmann.



Terminara Kuriero

TeKu 123

Decembro 2004

Komunikilo de Terminara Sekcio en Faka Komisiono de IFEF

Gvidanto de Faka Komisiono:

Jan Uldal Niemann, Hovedvagsstræde 9E, 1 DK-3000 Helsingør

Telefono: +45 49 26 13 19 Retadreso: esperanto@mail.dk

Sekretario de Terminara Sekcio:

D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2 DE-01445 Radebeul

Telefono: +49 351 8385877 Retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Karaj geamikoj,

en TeKu 122 mi rimarkigis, ke kunsida tempo en IFEF-kongresoj certe ĝenerale ne sufiĉas por necesdetale tiri terminajn konkludojn el la aktuala kvanto da tradukitaj difinoj, kaj ke sekve urĝe necesas uzi la tempon inter kongresoj por vigligi korespondan laboron. Intertempe pasis kvin monatoj dum kiuj alvenis nur malmultaj kontraŭproponoj. Pro tio mi volas jam deklari decidon pri jenaj terminoj sen problemoj:

el TeKu 121: 02822 = signalilo pri singarda veturado (SNCF)

Vidu modifitan difinon en TeKu 122.

07861 = transkargado interkontrakta

08135 = avertsono trakciila (laŭ propono de *Zdeněk Polák*)

08442 = areo envagona porkarga (laŭ propono de *Zdeněk Polák*)

08973 = trafiko distribua

11190 = magnetprodukta bendaĵo


12429 = fizikforta interligo

el TeKu 122: 06654 = regejo centra kompleksa

09560 = veturilo trajnotaŭga

Pri aliaj nocioj jen notoj:

- 00873 Por la difino en TeKu 121, paĝo 3, «Tuto de operacioj rilatantaj al emŝio kaj disdonado de biletoj» estis proponataj en TeKu 122, paĝo 4, du terminoj. Nun mi aldonas trian terminproponon:
 - 1) **biletkoncerna sfero**
 - 2) **biletkoncerna fako**
 - 3) **biletumado** *EMŝIO*
- 08719 Por la difino en TeKu 122, paĝo 5, «Tempo inter la momento kiam trajno ekfunkciigas anoncaparaton de traknivela pasejo, kaj la momento kiam la trajno atingas la traknivelan pasejon»
Akiya Yamamoto kaj *Zdeněk Polák* preferas la terminon «avertotempo alvetura», kaj *Heinz Dieter Hartig* proponis iel kombini la radikojn «avert-» kaj «ferm-». Jen la klarigoj en PIV:



averti 2 Antaŭsciigi kaj atentigi iun pri minacanta danĝero aŭ malbono.

fermi 2 Fari, ke io aŭ iu estu neatingebla, ne alirebla.
La tempo 08719 ne ampleksas la tutan avertito-fermito-tempon. Ja sekvas periodo kiam la trajno surveturas la pasejon. Pro tio necesas la adjektivo «alvetura». Jen du terminproponoj:

- 1) **avertotempo alvetura (traknivela pasejo)**
- 2) **fermtempo alvetura (traknivela pasejo)**

Mi mem preferas «fermtempo ...», ĉar – egale ĉu per bariero aŭ sole per ruĝa lumo – estas malpermesate uzi la ŝoseon aŭ piediran vojon de la traknivela pasejo.

- 09450 Por la difino b en TeKu 122, paĝo 5, kun bildo 1 «Rulekipaĵo por porti duaksajn normalŝpurajn vagonojn sur etŝpuraj fervojlinioj»

Zdeněk Polák fine proponis uzi la vorton «boĝio», ĉar la ekipaĵo vere enhavas ĉiujn karakterizaĵojn de boĝio. Sekve mi proponas:

- 1) **boĝio etŝpura vagonporta**
- 2) **stabloboĝio**

Jen la klarigoj en PIV:

boĝio Rulekipaĵo de trakveturilo, havanta plurajn radaksojn en turniĝpova framo.

stablo 2 Subportilo por tabuloj, ĉarpentaĵo kaj similaj, konsistanta el trabeto portata de kvar piedoj aŭ de du artikigitaj kadroj, fikseblaj je difinita angulo.

Por la difinoj a sur paĝo 5, kaj c sur paĝo 6 ne alvenis kontraŭproponoj. Sekve mi volas jam deklari decidon pri:

09450 a = veturilo etŝpura vagonporta
09450 c = vagono etŝpura vagonporta

- 10254 Mi ankoraŭ ne ricevis respondon de franca kolego, kio ĉe SNCF estas *Gare Principale Fret*. Vidu pri tio en TeKu 121, paĝo 6.
- 12324 Mi ankoraŭ ne ricevis informon, ĉu inter la nocioj 02023 kaj 12324 estas diferenco aŭ sinonimeco. Pri la difino 12324 vidu en TeKu 121, paĝo 7. Jen la terminoj en kelkaj naciaj lingvoj:

	02023	12324
dana	pa-beholder; storcontainer med læsseindretning	afrulningscontainer
franca	conteneur à porteur aménagé; conteneur p. a.	caisse amovible

germana	pa-Großbehälter; Großbehälter mit Verladeeinrichtung	Abrollcontainer
rumana	container „p. a.“ cu dispozitiv propriu de încărcare	container rulant

Kiu havas specialan scion pri tiaj konteneroj?

- 12416 Por la difino en TeKu 121, paĝo 7, «Infrastrukturaj aranĝoj (trafikkonstruaĵoj, telematiko) kiuj helpas eviti distancajn malfacilaĵojn, kun kostoredukto por la publiko» mi aldonas duan terminproponon:
 - 1) **lukto kontraŭ malproksimeco**
 - 2) **aranĝado kontraŭ malproksimeco**

El TeKu 122, paĝo 5, mi ripetas la decidon en *Sopron*, ke ni uzu la terminon «regejo» laŭ PIV anstataŭ la ĝis nun multfoje en *RailLexic* troviĝanta vorto «trakregejo». En *RailLexic 01141* la ĝenerala regejo havas jenan difinon:

«Memstare lokita teknika instalaĵo por regi trafikforojn kaj signalilojn, ebligi ties interrigladon, starigi, rigli kaj nuligi itinerojn, indiki funkciatajn, sekurigi trajnajn kaj manovrajn veturojn.»

Nova diskutenda temo koncernas diferencon inter regejo kaj aliaj ejoj por influi trajntrafikon. Tiaj aliaj ejoj ne enhavas trafiksekurigan teknikon, sed telekomunikas kun siaj suborditaj regejoj. En *RailLexic* estas difinitaj jenaj tri nocioj:

- 06680 Ejo por prigardi kaj direkti trafikon de pasaĝer- kaj vartrajnoj sur ĉeflinioj.

ĉeĥa	ústředna vedení provozu	itala	ufficio centrale di comando
dana	fjernstyringscentral (<i>kiel 06686</i>)	rumana	regulator central de trafic
franca	poste central de commandement	serba	centar za upravljanje saobraćajem
germana	Zentrale Betriebsleitung	slovaka	riadiace pracovisko dispečera
hungara	központi üzemirányítás	Esperanto	trajntrafikregejo centra
- 06686 Ejo en kiu oni disponas okaze de funkciaj perturboj kaj kapacitperdoj en trajntrafiko pri necesaj agoj por daŭrigi la trafikan fluecon sur la trakoj.

ĉeĥa	řízení dopravy	itala	ufficio di comando di movimento
dana	fjernstyringscentral (<i>kiel 06680</i>)	rumana	conducerea traficului
franca	poste de commandement	serba	operativna služba
germana	Zugleitung	slovaka	riadiace stavadlo
hungara	forgalomirányító központ	Esperanto	trajntrafikregejo
- 06721 Ejo por ordoni laŭtempan sinsekvon de trajnoj kaj necesajn agojn okaze de trajnmalfruigo.